der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

15. Jahrgang Nr. 97 (5/1979) 30 Pf

Kongresa rezolucio

La 64a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lucerno, Svislando, de la 28a julio ĝis la 4a de aŭgusto, 1979, kun partoprenantoj el 49 landoj, kaj studinte la temon „Lingvaj aspektoj de internacia organiziĝo", konstatas:

1. En nia epoko kontaktoj inter la nacioj, okazantaj jam de la plej fruaj historiaj epokoj, draste plimultiĝas, parte pro la rapida evoluo de la komunika teknologio, kaj parte pro la kreskanta interplektiĝo de la interesoj de la nacioj en sociaj ekonomiaj, kulturaj, juraj kaj aliaj terenoj.

2. Lingvaj samecoj kaj diferencoj ludas tre signifan rolon en la formiĝo de internaciaj kontaktoj kaj de la organizaj strukturoj, kiuj kreiĝas por ebligi tiujn kontaktojn.

3. La kontaktoj emas sekvi la liniojn de la internacia disvastiĝo de la unuopaj lingvoj; tiu disvastiĝo siavice estas rezulto de historiaj, ekonomiaj kaj politikaj evoluoj, kaj en multaj kazoj ĝi estas postlasaĵo de la kolonia epoko.

4. Lingvaj diferencoj siavice grave malhelpas la kreadon de horizontalaj strukturoj por transponti la menciitajn interesoliniojn.

5. Interalie, tiaj diferencoj ĝenas la agadon de ĉiuj ĉefaj interregistaraj organizoj tutmondaj kaj regionaj; la lingvaj servoj de la menciitaj organizoj foruzas grandan parton de iliaj buĝetoj, kaj la lingvaj reguloj aplikataj en la organizoj kaŭzas gravajn diskriminaciojn kaj maljustaĵojn.

6. Ankaŭ en aliaj formoj de internacia organiziĝo, ekzemple multnaciaj entreprenoj kaj sciencaj organizoj, aplikiĝas lingvaj praktikoj severe diskriminaciaj, kiuj favoras iujn lingvojn kaj malfavoras aliajn, tiel donante signifajn avantaĝojn al iuj landoj kaj ne al aliaj, kaj minacante kulturajn pluralismon kaj egalecon.

7. En internaciaj organizoj oni ĝis nun ne trovis adekvatan solvon al la problemo de lingva diverseco, precipe ĉar la lingva praktiko de tiuj organizoj estas bazita sur la supozo, ke ekzistas komune akceptebla ekvi-

libro inter lingva egaleco (la traktado de ĉiuj lingvoj kiel egalaj) unuflanke, kaj lingva unueco (la utiligo de unusola etna lingvo) aliflanke; tiu supozo estas fundamente erara kaj povas konduki al politikaj rivalecoj, diskriminacio, kaj superfluaj elspezoj.

8. Kelkaj organizoj, interalie Universala Esperanto-Asocio, aplikas alian solvon – la utiligon de la Internacia Lingvo Esperanto; tiu solvo samtempe ebligas egalecon (ĉiuj partoprenantoj en la laboro uzas duan lingvon, kiun ili devas lerni, sed kiu estas relative facile akirebla de ĉiuj homoj, kaj unuecon (ili uzas nur unu lingvon).

9. Post preskaŭ cent jaroj de utiligo en plej diversaj cirkonstancoj kaj medioj Esperanto plene konfirmis siajn pretendojn al serioza atento kiel funkcianta solvo de la problemo de lingvo en internacia organiziĝo; ĝi estas hodiaŭ uzata de centmiloj da homoj tra la tuta mondo, kaj grave kontribuas al internacia kompreniĝo.

10. Malgraŭ la signifoplenaj atingoj de Esperanto, ĝi nuntempe ne ricevas sufiĉan seriozan atenton de la grandaj interregistaraj organizoj kaj en aliaj internaciaj organizaj strukturoj; male, al tiuj diversaj organizoj nuntempe mankas adekvataj respondoj, samtempe justaj kaj praktikaj, al lingvaj problemoj.

11. Universala Esperanto-Asocio notas kun konsiderinda maltrankvilo, ke la grandaj internaciaj organizoj hezitas doni al Esperanto seriozan atenton, ĉar ili ŝajne timas, ke tia atento estos interpretata kiel rekta subteno; sed ĝi atentigas, ke ne eblas fari seriozan sciencan kaj racian decidon pri fenomeno, kiun oni ne studis objektive kaj detale; ĝi plue atentigas, ke la menciitaj organizoj ne sukcesis trovi pli bonan aŭ eĉ egale bonan solvon de la lingva problemo ĝis nun, kaj ne donas esperon, ke ili tion atingos en la estonteco.

12. Sekve, Universala Esperanto-Asocio forte alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO kaj aliaj tutmondaj kaj regionaj organizoj, ke ili dediĉu seriozan atenton al la lingva demando, kaj al la solvo, kiun prezentas Esperanto.

Akceptita, nome de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto, de la Komitato de Universala Esperanto-Asocio, en Lucerno, la 4-an de aŭgusto 1979.

Internaciaj renkontiĝoj 1979

„Heroldo de Esperanto“ (4 – 5/79) informas pri entute 130 internaciaj Esperanto-renkontiĝoj okazontaj (aŭ – intaj) dum 1979. De tiuj 130 renkontiĝoj en 26 landoj (5 ekstereŭropaj) en **Pollando** okazas 19, en **Hungario** 15, **Bulgario** 10, **ĈSSR** 9, en GDR kaj Jugoslavio po 1. Tio signifas, ke 55 aranĝoj (= 42,3 %) okazas en nur 6 landoj.

Kompreneble tiu statistiko estas nekompleta kaj tamen donas interesan bildon por la ĉefaj lokigoj de turismaj Esperanto-aktivecoj.

Pri la 64-a Universala Kongreso de Esperanto

En la lando de Hector Hodler

„Ni kvazaŭ revenis hejmen“ diris en sia kongresparolado d-ro H. Tonkin, la prezidanto de UEA aludante, ke ja estis la sviso Hector Hodler, kiu en la jaro 1908 fondis la Universalan Esperanto-Asocion. La 64-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 28-a de julio ĝis 4-a de aŭgusto 1979 en Lucerno, jam estis la sesa tiaspeca okazinta kongreso en Svisio, nome post tiuj en 1906 kaj 1925 en Ĝenevo, 1913, 1939 kaj 1947 en Bern. Ĉi jare alvenis pli ol 1600 kongresanoj el 49 landoj. Centran Laborondon de Esperanto en KL reprezentis ties prezidanto (Rudolf Hahlbohm) kaj la sekretario (d-ro Detlev Blanke).

La alta protekanto de la kongreso, la Federacia Prezidanto Hans Hürlimann, mem malhelpita partopreni la inaŭguron, substrekis en sia salutmesaĝo *„Nia lando kun siaj kvar lingvoj kaj tri kulturoj scias, kian decidan signifon havas la lingvo en la vivo de ĉiu homa socio. La Esperanto-movado akiris grandajn meritojn rilate al pli bona kompreno inter la homoj de diversaj lingvoj kaj kulturoj“*. Cetere, pri la lingva situacio en Svisio kaj entute pri la „fenomeno Svislando“ la kongresanoj povis orientiĝi per 144 p. originale verkita tre instrua libro de Arthur Baur, disponigita al ĉiu partopreninto de la kongreso.

Reprezentanto de ECOSOC

La solena inaŭguro ankaŭ ĉi-jare havis sian specifan trajton. 1977 ĝin partoprenis la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, pasintjare la vicprecidanto de la Bulgara Ŝtato Petr Tanĉev, kaj ĉijare oni denove povis aŭdi altan reprezentanton de UN-organizaĵo. Faris impresan paroladon la plej alta funkciulo de la Ekonomia kaj Sociala Konsilantaro de UN (ECOSOC), s-ro Robert Muller pri la temo „Internacia Organizo, komunikado kaj lingvoj“ (vd. eltiron sur p. 6). La alta funkciulo de ECOSOC klare substrekis sian aprezon por Esperanto.

Krom li la inaŭguron ankaŭ partoprenis reprezentantoj de la Organizo por Afrika Unueco (ambasadoro Omar Mahmud Muntasser), de Organizo de Amerikaj Ŝtatoj (Alejandro Orfila) de la Ligo de UN-organizaĵoj (d-ro Feeld) kaj de la Internacia Asocio de Konferenctradukistoj.

Ili, kiuj parte ankaŭ partoprenis diversajn kongresaranĝojn (i. a. podiajn diskutojn), per sia ĉeesto montris la kreskintan prestiĝon de UEA kaj ĝenerale de la Esperanto-movado ĉe tiuj gravaj internaciaj rondoj. Unu el la kortuŝaj kulminoj estis la apero de 30 infanoj el 9 landoj sur la tribuno, kiuj sin prezentis al la kongresanoj. Kiel ĉiujare, ankaŭ en Lucerno ne mankis la diplomatoj. Salutis la kongreson i. a. diplomatoj el Belgio, Brazilio, Bulgario, Ĉinio, Kubo, Danio, FRG, Pollando k. a. El Germana Demokratia Respubliko ĉeestis la konsulo s-ro Wagner.

Novaj decidoj

Gravan laboron dum la kongreso faris la komitato, kiu detale traktis la diversajn modifoproponojn de la statuto. Nova statutprojekto, kiu estis fine de 1978 publikigita kaj submetita al vasta diskuto al la membroj

de UEA, denove estis remodifita kaj intense diskutita de la Komitato de UEA, kiu ĝin akceptis, denove kun kelkaj ŝanĝoj. Oni povas diri, ke la nuna teksto, submetota al la ĝenerala voĉdonado, kiun partoprenos ĉiuj membroj de UEA, spegulas certan adapton de la asocio al la nuntempaj bezonoj, eblecoj kaj realaĵoj. Certe, ĝi ne estas perfekta kaj nur povas esti kompromiso inter diversaj vidpunktoj. Sed en sia nuna prilaborita formo ĝi meritas akcepton.

La Komitato ankaŭ akceptis la landajn asociojn de Ĉilio kaj Portugalio. Bedaŭrinde neniu reprezentanto de tiuj landoj partoprenis la kunsidon, kiam temis pri ilia akceptiĝo. (El Ĉilio neniu esperantisto partoprenis la kongreson). Espereble estonte la aliĝo de landaj asocioj estos pli serioze traktataj.

La Komitato faris vere grandan laboron ankaŭ en komisionoj, kiuj okupiĝis i. a. pri planado de la estonta UEA-agado, pri la novelektoj, eksteraj rilatoj (al neesperantistaj organizaĵoj), kulturo, turismo, financoj, landa agado, informado, kongresoj kaj virina agado.

Montriĝis i. a. la malfacileco distingi la prioritatojn de la estonta agado, pli klare fiksante la strategion kaj taktikon de la monda organizaĵo. La akceptitaj rezolucioj (vd. paĝojn 1-2) reliefigas kelkajn el tiuj problemoj.

Sciencaj aranĝoj

La Internacia Somera Universitato sub la rektoreco de magistro Claude Piron prezentis 11 prelegojn (Flora Szabo-Felsö: „Jura trakto de infanoj naskitaj ekster geedzeco"; Magomet Isajev: „Lingvaj problemoj en Sovetunio kaj Esperanto"; Jan Otto de Kat: „Nova evoluo pri ciklotronoj en la teknologia universitato de Delft"; Vilmos Benczik: „Rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de la orient-eŭropaj nacioj"; Tom Arbo Hoeg: „Pri sklaveco laŭ antikvaj leĝoj"; Hans Joachim Plehn: „La tuteŭropa patento kaj la lingva problemo"; Ralph A. Lewin: „La mistera kazo de la verdiĝintaj ursoj"; Carl Støp-Bowitz: „Prizorgado de la idoj ĉe bestoj"; Christian Bertin: „Konvertilo por konekto al X 25-a datenreto"; Wim M. A. de Smet: „La intelekta kapablo de la delfenoj"; Helmar Frank: „La influo de la Internacia Lingvo al la lerneja sukceso").

Ankaŭ la esperantologoj, post la sukceso lastjare en Varna, havis sian duan konferencon, kiun gvidis d-ro Detlev Blanke. (Marinko Ĝivoje: „La forto kaj la sorto de la Esperanta literaturo en la tutmondaj bibliotekoj"; Claude Gacond: „La Centro de Dokumentado kaj de Studo pri la Lingvo Internacia en La Chaux-de-Fonds"; Francois Lo Jacomo: „Kiel difini la lingvon Esperanto en la Statuto de UEA?"; Detlev Blanke: „Motivado de la signifo de la Esperantaj vortoj").

La partoprenintoj de speciala planlingvistika ekskurso havis la eblecon konatiĝi kun la ŝajne plej interesa science katalogata kaj flegata interlingvistika arkivego de la mondo, en la horloĝa metropolo de Svisio, La Chaux-de-Fonds.

Ankaŭ la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo prenis diversajn decidojn por stimuli la agadon sur scienca kampo.

Fakaj aranĝoj

Kiel kutime abundis la plej diversaj fakaj aranĝoj. La Mondpaca Esperantista Movado (MEM), aŭskultinte raporton de sia prezidanto I. Pethes, traktis pri problemoj de la estonta agado substrekante la neceson ĉiuflanke subteni la klopodojn pri malarmado. Ĉi-rilate valoras mencii, ke sovetaj esperantistoj (da ili partoprenis 20 personoj la kongreson) esperantigis la SALT-II-materialojn kaj ĝin aperigis en speciala eldono de „Moscow-News" No. 30 (2862), 1979. Ankaŭ la nova GDR-eldono de „Paco" trovis intereson. Dum la kongreso plue okazis aranĝoj de la Akademio (bedaŭrinde, kiel kutime, nepublika) Eldonejo Stafeto, aŭtomobilistoj, fervojistoj, filatelistoj, instruistoj (ILEI), katolikoj kaj protestantoj, matematikistoj, medicinistoj (UMEA) muzikistoj, naturistoj, ornitologoj, radioamatoroj, sciencistoj (ISAE), sporta agado, ŝakistoj (EŜLI), virina agado (kun speciala programo) k. a.

La kongresano povis elekti inter pli ol 170 (!) diversspecaj aranĝoj, inter kiuj la plej multaj okazis paralele.

Vasta kultura oferto

Kiel ĉiujare ankaŭ en Lucerno oni prezentis tre multflankan kulturan programon. La rikolto de la Belartaj Konkursoj estis optimismiga. La Bulgara Esperanto Teatro prezentis la spektaklon „Amo" de Paul Géraldy. kantis la bulgaroj Galja Kostova-Toteva, Veselin Damjanov (de kiu ĵus aperis dua disko), Prodan Prodanov, la polino Bożena Zborowska kaj prezentis sian monodraman arton Jadwiga Gibczynska („Majnimfo", „Marie Curie"). Internacia Arta Vespero, muzikaj prezentoj, recitaloj, svisa vespero kaj aliaj aranĝoj montris la kulturan valoron de la esperantlingva arto. Kompreneble ne mankis la tradiciaj eroj kiel Interkona Vespero, Distra kaj Junulara Vesperoj, Kongresa Balo kaj ekskursoj.

Entute, tiu kongreso estis bonege preparita de la diligenta LKK sub gvido de s-ro Kurt Greutert, havis altan nivelon kaj montris la konsiderindajn progresojn lastatempajn de UEA kaj de la Esperanto-movado entute.

La 65-a UK okazos 1980 en la sveda metropolo kaj la 66-a 1981 en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo,

*

Al niaj karaj geamikoj en GDR

En centro de Eŭropo
Jam tridek jarojn floras
Libera popolŝtato,
Por paco ĝi laboras.

En tiu lando vivas
Por ni amikoj karaj,
Kunigis nin kun ili
Eventoj epokfaraj.

Al ili flugu nia
Amplena korindiko:
Vivu Demokratia
Germana Respubliko!

Arturo Kubulnieks

El la parolado de Robert Muller,
Sekretario de ECOSOC

Mankas tutmonda lingva politiko

Lingve, la mondo prezentas jenan ĝeneralan bildon:
ekzistas proksimume 5000 lingvoj, el kiuj nur duono havas skriban formon. Pluraj el tiuj lingvoj — la plej malaltaj sur la skalo de graveco — mortas ĉiujare. Supre, konstateblas, ke naskiĝas novaj lingvoj, precipe sciencaj, kiuj multobliĝas je konsiderinda ritmo: miloj da sciencaj terminoj ja ĉiumonate kreiĝas. Surkampe de la komputoroj, novaj lingvoj eĉ estas kreataj de firmaoj, kiuj certigas al si monopolon super ilia uzo. La internaciaj institucioj strebas enmeti iom pli da ordo tiukampe, precipe UNESKO, sed ankaŭ ĉiu specialigita institucio en sia sfero. Interesajn ekzemplojn oni povus citi, aparte sur la kampoj de saneco kaj aviado, sed ankaŭ sur aliaj. Tamen, verdire, ne ekzistas tutmonda lingva politiko. Malantaŭ tiuj sciencaj lingvoj staras la lingvoj uzataj por internacia komunikado, ĉefe la angla kaj franca, kaj ankaŭ, pli kaj pli, la hispana. Post tiuj troviĝas la naciaj lingvoj, kies graveco ege diferencas laŭ la demografio, kaj tiuj estas tre profunde enradikiĝintaj, ĉar ili estas ligitaj al la politika, ekonomia kaj kultura fenomeno. Mi ne povas longe profundiĝi en la vasta gamo de la lingvaj problemoj ĉiplanedaj, kaj limigos min je subteno al la rekomendo de Prof. Tonkin, nome ke oni entreprenu ĝeneralan studon de la problemo, ke oni inventaru ĉion, kio tiukampe okazas, kaj provu alpreni tutmondan lingvan strategion por nia planedo.

Mi opinias, ke tiurilate la Esperanto-movado kaj via kongreso povas ludi gravegan rolon. Ne pro tio, ke monda registaro aŭ universala lingvo nun ne aperas eblaj, ne pro tio oni evitu tion priparoli kaj diskuti. Tute male. La mondo senĉese bezonas modelojn, kiuj impresu al la imago kaj al la mondvizio de la homoj. Ni bezonas revojn. Preskaŭ ĉiuj grandaj mutacioj en la historio rezultis el revoj kaj pensoj viziaj. Eble hodiaŭ la mondo ne plu revas sufiĉe. Eble tial ni pasas tra pesimisma fazo ĝuste tiam, kiam ni staras je la montopinto de senprecedencaj sukcesoj kaj ĉe promesoj anoraŭ pli vastaj. Kiam mi estis infano oni multe parolis pri Esperanto kaj pri mondregistaro. Oni ilin mencias malpli ofte hodiaŭ. Tio ne estas bona. Necesas memorigi al la ekzistantaj povoj, ke sur nia planedo eblas aliaj administraj formoj. Tio almenaŭ prezentos tiun avantaĝon, ke ili fariĝos iom pli viziemaj kaj iom malpli necedemaj. Mi do tutkore deziras, ke el via kongreso fontu aŭdaca strategio, kiu denove tuŝu la imagon kaj la animon de la homoj. Tiun strategion devus akompani apartaj agadoj precipe direktotaj al la internacia komunikado kaj al ties ĉefaj rimedoj aŭ perantoj: UN kaj ties specialigitaj institucioj, la transnaciaj firmaoj, la gazetaro kaj aliaj informrimedoj, la religioj, la internacia eduksistemo, la i..ternaciaj transportoj, la internaciaj neregistaraj organizoj, turismo, hoteloj, ktp.

Mi deziras al vi grandan sukceson en la nobla kaj viziista tasko, kiun vi prenis sur vin, kaj kiu estas nenio alia, longperspektive, ol starigi mondan demokration, specife pere de la uzo de lingvo universala.

El la parolado de d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA

Kontaktoj kun UN kaj UNESKO

. . . Ni estas malmultaj, kaj la tasko estas granda: sed ni laboras por lingvo kaj idealo tiel gravaj kaj tielsignifaj, ke ni nek rajtas nek povas laciĝi aŭ deflankiĝi. Kiel lernintoj de Esperanto, kiel eltrovintoj de tiu miraklo de la homa komunikado, ni tiris sur nin, vole-nevole, la moralan devon antaŭ la mondo ĝin disvastigi kaj ĝin sukcesigi.

Se oni trarigardas la laboron de la jaro 1978/79 oni vidas tuj la spurojn de tiu nova epoko kaj oni konstatas la fortan pozicion, en kiu nia Asocio nun troviĝas. . . .

. . . Sed ne nur ĉar tiu estas mia propra fako, sed ankaŭ ĉar ĝi konsistigas la profilon, por tiel diri, de UEA, mi deziras paroli iom pli detale pri la eksteraj rilatoj. Legantoj de la Estrara Raporto tuj povas konstati, ke la vigliĝo de niaj aktivecoj daŭras. Precipe lastatempaj novaĵoj el UNESKO kaj niaj novaj kontaktoj kun UN (reprezentataj ekzemple en la persono de s-ro Muller) tion klare pruvas.

En la kontaktojn kun UN kaj UNESCO ni havas du ĉefajn celojn: atentigo al tiuj organizoj pri la ege utila rolo, kiun Esperanto povus ludi en iliaj internaj aferoj, kaj partopreno en iliaj programoj por vaste informadi kaj esplori pri la monda lingva situacio kaj la utiligo de Esperanto.

Kiam temas pri la interna utiligo de Esperanto en internaciaj organizoj, ni havas ĉe ni du fortajn argumentojn, kiuj formas la bazon de nia intelekta pozicio. Unu rilatas al la kosto de lingvaj servoj kaj ilia relative malalta kvalito. La lingvaj servoj de UN kaj ĝiaj specialigitaj instancoj elspezas pli ol cent milionojn da dolaroj jare. Malgraŭ la alta kvalito de siaj interpretistoj kaj tradukistoj, kiel tiaj, ili ne atingas plene kontentigajn rezultojn. Okazas ofte paneoj en la servoj, kaj la rimedoj je ilia dispono ne sufiĉas por ĉiam produkti plej altnivelajn tradukojn aŭ liveri ĉiujn konferencajn servojn. Pri la mankoj en la nunaj servoj neniu persono — eĉ la anoj de la servoj mem — dubas. Sed kio mirigas estas la fakto, ke serĉante solvojn al la nunaj problemoj, neniu rigardas preter la nuna lingva reĝimo en la koncerna organizo al pli radikalaj solvoj. La grandaj internaciaj organizoj turniĝas sterile inter feblaj proponoj pri redukto de dokumentado, simpligo de konferencoj, aŭ interfaka kunlaboro — proponoj — plene neadekvataj al la dimensioj de iliaj lingvaj problemoj — sen eĉ konsideri la eblecon, ke enkonduko de nova lingvo, nome Esperanto, povus tiel redukti iliajn kostojn kaj tiel plibonigi la kvalitojn de iliaj servoj, ke ili fine povus fari la veran laboron de la organizo efike kaj rapide kaj kun plenaj rezultoj.

Nia dua argumento rilatas al diskriminacio. Nur certaj ŝtatojmembroj ĉe UN kaj UNESKO havas la rajton uzi la propran lingvon en la debatoj kaj ricevi dokumentojn en la propra lingvo. Sed ĉiuj ŝtatoj-membroj kontribuas al la kostoj de la lingvaj servoj kaj devas submetiĝi al la ekzistanta lingva reĝimo interne de la organizo. El tio kreskas speco de diskriminacio, en kiu certaj registaroj ĝuas avantaĝon en la debatoj kaj en la dokumentado, dum aliaj ne havas tiujn avantaĝojn. Ili estas devigataj uzi fremdan lingvon en la oficiala laboro de la organizo kaj devas mem prizorgi tradukojn de la ĉefaj dokumentoj por la propra uzo en la propra lando. Tre

ofte la landoj, kiuj ne disponas pri unu el la laboraj lingvoj estas ĝuste la ekonomie malpli fortaj. Ekzistas evidente kunligo inter la akceptigo de difinita lingvo kiel laborlingvo ĉe UN kaj la ekonomia kaj politika forteco de la landoj, kiuj uzas ĝin.

Tiuj du argumentoj postulas du diversajn strategiojn, unu ĉefe direktita al la industriaj landoj, kiuj kontribuas la plej grandan sumon por subteni UN kaj UNESKO, la alia direktita ĉefe al tiuj ŝtatoj-membroj, kies lingvoj ne estas nuntempe uzataj en la laboro. La unua devas emfazi la kostojn: la alia devas emfazi la diskriminacion.

Kiam temas pri la kostoj de la nunaj lingvaj servoj, la funkciuloj de UN kaj UNESKO estas esence sen tre utilaj ideoj pri redukto de tiuj kostoj. Ĉar ĉiuj laboraj lingvoj devas esti traktataj egalaj, la plej evidenta maniero ŝpari monon, nome redukti servojn por certaj lingvoj, estas politike neakceptebla. Kio gravas ĉi tie, tamen, estas la fakto, ke Esperanto momente ne estas sur la tagordo de la diskutoj pri tiu ĉi problemo. La lingvaj servoj kaj la planistoj de la grandaj internaciaj organizoj plejparte aŭ ne kredas la avantaĝojn de Esperanto, aŭ ne komprenas kiel Esperanto povus plibonigi por ili la situacion.

Vi komprenu, ke tio ne estas pro ia fundamenta obstino iliaflanke, sed unuavice pro la politikaj kaj intelektaj cirkonstancoj, en kiuj ili troviĝas. La Internacia Komisiono pri Problemoj de Komunikado, ekzemple, estis starigita de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO fine de 1977 kaj devas prezenti sian finan raporton ĝis la fino de la nuna jaro. Ĝis nun ĝi produktis okdekon da referaĵoj pri komunikaj problemoj. Ne pli ol dudek eĉ aludas lingvojn, kaj eĉ ne unu donas sisteman atenton al lingvaj problemoj. Ĉi tie ne temas pri iu rifuzo agnoski Esperanton, aŭ iu dubo pri ĝia seriozeco. Temas pri fundamenta kaj kompleta nerekono pri la graveco de lingva komunikado. Ne estas nur la Esperanto-movado, kiu estas ignorata de la specialistoj pri komunikado, sed ankaŭ niaj gefratoj inter la lingvaj instruistoj, la organizoj, kiuj okupiĝas pri lingvoj, ktp.

Pro iom samaj kaŭzoj, kiam UNESKO malfermis la debaton pri la Rajto je Komunikado antaŭ kelkaj jaroj, ĝi ne rekonis la lingvan dimension de tiu rajto. Eĉ ĝi okazigis la unuan konferencon pri tiu temo ekskluzive en la angla lingvo. Estis UEA, kiu per sia kongreso en 1977 unue levis tiun demandon. Estis UEA, kiu proponis, ke la neregistaraj organizaĵoj organizu simpozion pri la rajto de komunikado — simpozion, kiu realiĝis en marto de la nuna jaro. Estis UEA kiu en la pasinta decembro prezentis al la Komisiono pri Komunikaj Problemoj detalan komentarion pri la graveco de la lingvo kiel problemo kaj solvo de la internacia komunikado. Kaj al tiu instanco kiu nuntempe esploras la lingvajn servojn de UN, nome la Komuna Inspecta Unuo, estis UEA kiu prezentis studon pri la tradukaj servoj en internaciaj organizoj, en kiu ĝi aparte pledis por studo de Esperanto kiel ebla solvo de la nunaj malfacilaĵoj en la lingvaj servoj. . . .

. . . Sed la tempoj kaj la fluoj de eventoj laboras por ni. Ĉiam surbaze de la rezolucio de UNESKO de 1954 kaj de aliaj similaj atingoj, ni kreas tutan serion da novaj enpenetroj en la programojn kaj laboron de UNESKO kaj UN, ekde la partopreno de la Ĝenerala Direktoro mem en nia kongreso de 1977 ĝis la renovigo de tiuj kontaktoj en januaro de la nuna jaro en Parizo, la organizado de la jam menciita simpozio pri la rajto je komunikado ĉe UNESKO en marto, kaj — eble ĉefe — nia elektiĝo al la Konstanta Ko-

Ludwig Schödl - 70 jara



Neeblas — nia Ludwig jam 70 jara? — diros liaj geamikoj kaj ni, gratulante al nia vicprezidanto de Centra Laborrondo, kiu jus, la 31an de oktobro, festis sian rondan jubileon.

Neniel mirinde, alte estimata de siaj ekslernantoj kaj kolegoj el la „Lernejo de la Paco" en Neuruppin, de la esperantistoj en GDR kaj eksterlando, Ludwig konservis al si iun freŝan viglecon kaj spiritan elastecon, kiun oni devas admiri. Naskita en Berin, filo de laborista familio, frue engaĝita komunisto, li havis malfacilan vivon antaŭ kaj post 1933. Antaŭe, ĉar la juna ilfaristo politike aktivadis, kaj poste, ĉar la cirkonstancoj, post ilegala agado, devigis lin elmigri al Francio.

Post la frakaso de faŝismo Ludwig Schödl apartenis al la aktivistoj de la unua horo. Li decidis dediĉi sian forton al la kleriga laboro, unue por plenkreskuloj, poste por infanoj. Li fariĝis instruisto, direktoro de supera lernejo.

Esperanto ludis kaj ludas en la vivo de Ludwig Schödl centran rolon, sed kiel rimedo ne kiel memcelo. Profunde konvinkita internaciisto Ludwig Schödl ĉiam kombinis sian Esperanto-agadon kun sia politiko. Li apartenas al tiuj malmultaj iamaj aktivistoj de LEA el la generacio de Rudi Graetz, kiuj forte donis al la Esperanto-movado en GDR sian ŝtampon. Li apartenas al la fondintoj de Centra Laborrondo, verkis lernolibron kantaretojn, metodikajn materialojn kaj multajn artikolojn li faris sennombrajn prelegojn transprenis gravajn funkciojn kaj ĝis hodiaŭ dediĉas grandar parton de sia tempo al Esperanto. Multaj lernis en liaj kursoj. Daŭre ni lernadas de li. Al Ludwig Schödl kaj lia ankaŭ esperante aktiva edzino ni dankas pro ĉio ĝis nun farita kaj deziras ankoraŭ tre viglajn sanajn kaj feliĉajn jarojn.

CLE



Ludwig Schödl kontaktigis la teatrojn el Rostock/GDR kaj Turku/Finnlando pere Esperanto.

Komitata rezolucio

1. La Komitato de Universala Esperanto-Asocio, kunveninte en Lucerno, Svislando, okaze de la 64a Universala Kongreso de Esperanto, sendas la salutojn kaj bondezirojn de la Asocio al la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Eduko, Scienco kaj Kulturo, UNESKO, kaj al ĝia Ĝenerala Direktoro, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow.

2. Ĝi notas kun aparta plezuro, ke la jaro 1979 markas la 25an datrevenon de la kulaboro inter UNESKO kaj la Asocio, kiu komenciĝis per akcepto de la rezolucio IV. 1. 4. 422 de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo en 1954.

3. Ĝi plue notas, ke dum tiu tuta periodo la Asocio aktive kunlaboris en ĉiuj ĉefaj kampanjoj kaj specialaj programoj de UNESKO, konsiladis al UNESKO pri aktivecoj komune interesaj, kaj disvastigis informojn pri la laboro de UNESKO al milionoj da homoj en pli ol okdek landoj pere de la Internacia Lingvo Esperanto.

4. Ĝi rekonfirmas la deziron de la Asocio daŭrigi, en proksima kunlaboro kun UNESCO, sian agadon por internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo, notitan en la menciita rezolucio. Ĝi emfazas la gravecon de tia fruktodona kunlaboro inter neregistaraj organizoj kaj la grandaj interregistaraj organizoj, kaj ĝi esprimas la intencon de la Asocio labori en tiu senco, interalie per sia partopreno kiel ano de la Konstanta Komitato de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsultaj Rilatoj kun UNESKO.

5. Ĝi aparte invitas Uneskon al kunlaboro sur la kampo de lingvaj kaj komunikaj problemoj. Ĝi atentigas, ke UEA estas ne nur Asocio, kiu pledas por difinita solvo de la lingva problemo, sed ankaŭ Asocio, kiu aktive aplikas tiun solvon en sia agado. Ĝi invitas UNESKON objektive studi la pretendojn kaj atingojn de la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝi alvokas al la membroj-ŝtatoj de UNESKO, ke ili kunlaboru tiucele.

6. Ĝi notas tute speciale, ke la problemo de lingvoj kaj la problemo de komunikado ĝenerale estas nedisigeblaj, kaj ke esploro de unu implicas esploron de la alia. En tiu kunteksto, ĝi alvokas al la Internacia Komisiono pri Problemoj de Komunikado, starigita de la Ĝenerala Direktoro en 1977, ke ĝi ne neglektu la lingvan dimension de sia studkampo.

7. Ĝi notas kun plezuro, ke la Ĝenerala Direktoro, per sia ĉeesto en la 62a Universala Kongreso de Esperanto en 1977, emfazis la gravecon de la rolo de lingvoj en la sekurigo de la Rajto je Komunikado, kaj ĝi konfirmas la deziron de la Asocio daŭrigi siajn esplorojn en ĉi tiu kampo — deziron jam esprimitan per la iniciata kaj gvida rolo de UEA en la lastatempe okazinta Kolokvo pri la Rajto je Komunikado organizita en Parizo de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsultaj Rilatoj kun UNESKO.

Lucerno, la 4-an de aŭgusto 1979

Junularo renkontiĝis en Aŭsterlico

La malgranda vilaĝo Aŭsterlico ĉe la urbo Zeist en Nederlando ĉijare estis la loko de la 35-a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis de 20-a ĝis 27-a de julio.

Ĝin organizis TEJO kune kun Nederlanda Esperanto-Junularo. La kongresa temo estis „Interŝtataj unniĝoj — kiucele?". Al la kongreso alvenis entute 350 junaj esperantistoj el 25 landoj. La Junularan Sekcion de Centra Laborrondo reprezentis Michael Lennartz.

Ĉefan prelegon pri la kongresa temo faris d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, kiu prilumis la komunikajn aspektojn de la internaciaj organizaĵoj.

La studgrupoj okupiĝis i. a. pri gardo de la homa medio trans la landaj limoj, internaciaj organizoj en antikva helena tempo, la rilatoj inter interŝtataj organizaĵoj kaj nacia identeco, k. a.

La studgrupon „Internaciaj ekonomiaj socialismaj organizoj" gvidis Michael Lennartz. La kongresa programo estis tre ampleksa, kiel kutime. La Komitato kunsidis ofte kaj i. a. akceptis rezolucion (vidu paĝon 11-12).

Okazis lingvokursoj diversnivelaj por Esperanto kaj por la nederlanda. Ankaŭ esperantologian kurson oni ofertis. Kiom tiuj aranĝoj ankaŭ filmoj, teatraĵoj, popoldancoj, internaciaj vesperoj, ekskursoj kaj sennombraj amikaj renkontiĝoj (du — kaj multflankaj) donis al la kongreso sian junuleskan etoson. Kompreneble, oni ankaŭ elektis novan estraron. Prezidanto fariĝis la novcelanda aktivulo Stefan Mac Gill. Vicprezidantas C. Lendvay el Hungario kaj B. Cassini el Italio. Ĝenerala sekretario elektiĝis T. Bormann el FRG. Pluaj membroj de la Estraro estas Z. Metz (Jugoslavio), I. Jackson (Britio), B. Venhuizen (Nederlando), A. Wandel (Izraelo) kaj Michael Lennartz el GDR.

La 36-a Internacia Junulara Kongreso okazos fine de de julio 1980 en Rauma/Finnlando.

*

Rezolucio

La 25-landaj partoprenantoj de la 35a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo TEJO, okazinta de la 20a ĝis la 27a de julio 1979 en Aŭsterlico (Zeist), Nederlando,

diskutinte

la temon „Interŝtataj Unuiĝoj — Kiucele?" kunlabore kun reprezentantoj de Unuiĝintaj Nacioj, Monda Federacio de Demokratia Junularo, Junaj Eŭropaj[1]) Federiistoj, Internacia Studenta Movado por UN, Eŭropa Kunordiga Buroo por Internaciaj Junularaj Organizoj,

substrekas

la kreskantan signifon de internaciaj rilatoj, interŝtataj unuiĝoj kaj organizoj,

atentigas
pri la neceso, ke estu respektataj suvereneco kaj sendependeco de ĉiuj etnoj kaj nacioj en la procezo de pliinternaciiĝo de la tuta socia vivo,

deklaras
sian volon subteni internaciajn agadojn por malstreĉiĝo, malarmado kaj paca kunekzistado,

deziras
pli intensan kunlaboron kaj kulturan interŝangon inter Esperanto-Asocioj de diversaj sociordoj,

subtenas
la pligraviĝantajn rilatojn de UEA kun UNESKO kaj UN sur la kampo de komunikado,

esprimas
sian intencon plifortigi la kunlaboron de TEJO kun aliaj internaciaj junularaj organizoj, kaj pere de siaj Landaj Sekcioj kun ĉiuj naciaj junularaj organizoj.

---

[1]) legu „okcidenteŭropa“

★

Ŝako kaj Esperanto

En „der esperantist“ 6/77, paĝo 21 jam aperis noto pri „Ŝako kaj glumarkoj“ en kiu A. Knapp menciis la IIan teamturniron de EŜLI, la „Esperantan Ŝak-Ligon Internacian“, kaj la GDR-teamon, kiu partoprenis tiun turniron. La 10an de aprilo 1979 finiĝis tiu turniro.
Nia GDR-teamo konsistis el la ludantoj, K.-D. Stegemann, E. Schütze, A. Knapp (nia peranto) kaj H. Kirmse, la turnirgvidanto. Ni startis kune kun 6 aliaj teamoj en la Grupo B, dum en la grupoj A ĝis C partoprenis entute 21 teamoj.
En la grupo A, la grupo en kiu ludis la plej fortaj EŜLI-anoj, la teamo BOHEMIO (ČSR) havas 15 ½ poentojn el 21 partioj kaj la 1an rangon, sekvas la teamoj Nederlando (14 ½ el 21 partioj) kaj Sovetunio (13 ½ el 21 partioj), krome FRG, Jugoslavio, Finnlando kaj FERVOJISTO (ČSR).
En la grupo B la teamo HUNGARIO A finis ĉiujn partiojn kaj atingis la unuan rangon (16 ½ poentoj), sekvas la teamo SOKOL (ČSR, 15 poentoj) kaj la teamo BOHEMIO II (ČSR 12 ½ poentoj el 23 partioj). Post la teamo KANADO/USONO (11 ½) sekvas nia teamo GDR (8 poentoj el 23 partioj) kaj krome FRANCIO A kaj RUMANIO A.
En la grupo C la teamo SOFIO (Bulgario) atingis 19 ½ poentojn kaj per tio la 1an rangon, sekvas ČAVDAR (Bulgario) 17 ½ poentoj, poste HUNGARIO B (14 poentoj). Krome sekvas BOHEMIO III, RUMANIO B, FRANCIO/HISPANIO kaj DINAMO (ČSR).
Intertempe la teamturnirgvidanto startis jam la IIIan teamturniron nome por la grupoj A (la 1-an de julio 1979 kun 9 teamoj), B-1 (la 15an de aŭgusto 1979 por 7 teamoj inkluzive la teamon GDR I) kaj grupo B-2 (la 20an de septembro 1979, 7 teamoj). Nun atendas pluaj 22 teamoj — inter aliaj la teamoj GDR II kaj GDR III — la startdaton por siaj grupoj C-1 ĝis C-3.
Ĉu vi ankaŭ ludas ŝakon kaj havas intereson pri EŜLI?
Tiam skribu tre baldaŭ al nia peranto Alfred Knapp, 5302 Bad Berka, Domagkstraße 7, aŭ al la teamturnirgvidanto Horst Kirmse, 6900 Jena, Naumburger Straße 23.

H. Kirmse

Esperanto antaŭ la forumo de la Monda Packonsilantaro

Inter la 6a kaj 8a de marto 1979, la Monda Packonsilantaro aranĝis en Helsinki Solidaran Konferencon por Vjetnamio.

Dum la konferenco oni debatis la danĝerplenan situacion, estiĝintan sekve de la brutala atako de Ĉinio kontraŭ la multe suferinta Vjetnamio. Ĉiuj delegitoj akcente deklaris **agresado** la ofensivon de la ĉina armeo kaj samtempe ili esprimis plenan solidarecon al la popolo de Vjetnamio, luktanta por sia libereco.

Estas nekontesteble — konstatis la delegitaro — ke la ofensivo de la naŭcent-miliona Ĉinio — sin nomanta „socialisma ŝtato — neglektas, eĉ oponas la principojn de la internacia juro. Surbaze de tiu fakto la Konferenco protestis kontraŭ la ĉinaj militagoj.

Laŭ la Rezolucio, akceptita de la konferenco, MPK alvokas la tutmondan pacamikaron kaj ĉiujn pacdefendajn, pacemajn organizaĵojn subteni — per pozitiva solidareco — la popolon de Vjetnamio en la altrudita batalo. La 7an de marto la prezidanto de la konferenco invitis al la mikrofono inter alie s-anon d-ron Imre Pethes, prezidanto de MEM (Mondpaca Esperantista Movado). S-ano Pethes salutis la konferencon kaj prezentis sian alparolon en la internacia lingvo Esperanto. La partoprenantoj atentis kun interesiĝo la parolon de Imre Pethes, ja Esperanto estis parolata la unuan fojon dum aranĝoj de MPK. Tiu fakto, ke Monda Packonsilantaro disponigis forumon por MEM en Helsinki, estas sukceso por Esperanto, ĉar tio signifas la rekonon de la internacia lingvo ankaŭ en la sferoj de supera ne-Esperanto-organizaĵo.

La esperantlingva alparolo de d-ro Pethes — prezentita en Helsinki — vekis viglan eĥon flanke de la delegitoj, kiuj petis kaj ricevis detalan informon de li pri la internacia lingvo Esperanto.

Estas menciinde, ke s-ro Romesh Chandra, prezidanto de la Monda Packonsilantaro, akceptis kontente la alparolon de s-ano Pethes. La prezidanto de MPK anticipe disponigis forumon por MEM, okaze de la sekva asembleo de MPK.

Ĉio ĉi donas esperon por pluaj sukcesaj kontribuoj de esperantistaj aktivuloj sur tereno de la internacia pacmovado.

Lajos Kapitány

(El „Budapeŝta Informilo“ 4-5/79)

*

Filio de ASE en Leningrad

La 28an de junio 1979 fondiĝis en Leningrado filio de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj en SSOD. La konata veterano de la Sovetunia Esperantomovado, prof. Semjon N. Podkaminer, faris raporton pri la temo „Nova etapo en la evoluo de la sovetia Esperanto-movado kaj taskoj de la leningradaj esperantistoj“. Oni elektis 15-personan estraron. Kiel prezidanto elektiĝis docento Stefanov, Honora prezidanto kaj estrarano fariĝis S. N. Podkaminer.

Dum sia unua kunsido la estraro akceptis planon por la estonta agado, kiu i. a. antaŭvidas aktivaĵojn en la internacia, informpropaganda, ideologia, eduka, porpaca, junulara, instruista kaj literaturarta kampoj (i. a. fondo de Esperanto-teatro).

Mi aplaŭdas al kreiĝo de Esperantista Asocio . . .

La mateno la 14-an de marto 1979 en Moskvo estis neĝo-kota kaj malvarmeta ĉu malfrua vintro, ĉu frua printempo. Sed pli ol cent moskvanoj kaj gastoj, kolektiĝintaj en la Domo de Amikeco en Kalininavenuo, venis ĉi-tien antaŭsente de la festo. De sur la muroj de la halo ilin salutis afiŝoj en la rusa kaj Esperanto: „Tutsovetia fonda konferenco de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj". Kaj ŝajnis, la muroj mem fiksrigardis la gastojn, parolintajn en la lingvo de neekzistanta lando Esperantujo.

La unua impreso: la esperantistoj estas homoj tre diversaj. Moskva profesoro Grigorij Demidjuk, tradukinta al Esperanto la verkon de V. I. Lenin „Ŝtato kaj revolucio", kaj studento el Krasnojarsko Vladimir Sapojnikov, edukistino en infanĝardeno el Rostovo Tatjana Kurepina kaj ministro pri klerigo de Estona SSR Ferdinand Eisen, elektromuntistino el Rigo Saucerite Neilande kaj akademiano de Armena Scienca Akademio Gurgen Sevak. Sed estas io komuna, unuiganta ilin, ĉiujn, — la firma deziro uzi la internacian planlingvon Esperanto por disvastigi la helajn ideojn de paco kaj socialismo.

La deka horo matene. La konferencanoj eksidas ĉe longaj tabloj. Ĉe la prezida tablo estas respondecaj funkciuloj de CK de KPSU, CK de VLKSM, VCSPS kaj Unio de Sovetiaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj (SSOD), membroj de Esperanto-komisiono de SSOD. Estas akceptata la tagordo. La parolon por la raporto „Pri la stato kaj rimedoj por plibonigo de esperantista laboro en la lando kaj pliefikigo de la internaciaj rilatoj" ricevas la prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetiaj Esperantistoj profesoro, doktoro de filologiaj sciencoj, Mahomet Isajev.

La demandon pri kreo de ASE prilumis en sia raporto Miĥail Pesljak, vicprezidanto de la Prezidio de SSOD, prezidanto de prepara komitato de la fonda konferenco de ASE.

Li diris, ke la organiza komitato de la fonda konferenco difinis el diversaj fontoj, ke la nombro de la interesiĝantoj pri Esperanto en nia lando atingas 9-10 mil personojn, el kiuj duono (4,5-4,7) lernas la lingvon en 90 rondetoj, funkciantaj ĉe sindikataj kluboj, kulturdomoj, ĉe urbaj kaj regionaj komitatoj de komsomolo.

La ĉefaj laborformoj estas: lernado de lingvo, legado de literaturo, organizado de programaj vesperoj, korespondado kun sovetiaj kaj eksterlandaj esperantistoj k. t. p. Lastatempe ĉiujare estas organizataj someraj tendaroj. Dezirante partoprenigi la sovetiajn esperantistojn en internaciaj ligoj, SSOD kreis en 1962 E-komisionon, kaj faris certan laboron, pri kio parolis la antaŭa raportinto.

La laboro de la ekzistinta ĉe SSOD Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj meritas bonan aprezon. En la nomo de SSOD mi transdonas al la tuta konsisto de la Komisiono grandan dankon, kaj esprimas certecon, ke la kamaradoj el tiu komisiono iĝos aktivaj partoprenantoj de la fondata nun Asocio de sovetiaj esperantistoj.

Tamen lastatempe en la agado de sovetiaj esperantistoj aperis seriozaj mankoj. Rondetoj kaj kluboj laboras dise, la studlaboro estas farata nekontentige. La instruantoj ne ĉiam havas sufiĉan ĝeneralan kleron. Ofte ne sufiĉas lerniloj, kiuj praktike ne estas eldonataj.

Buroo de Prezidio de SSOD, Sekretariaro de VCSPS kaj Sekretariaro de CK de VLKSM pridiskutinte ĉiuflanke la aferstaton en nia Esperanto-movado trovis necesa entrepreni rimedojn por ordigi la agadon de esperantistoj, por bonigi ilian laboron en la sfero de internaciaj ligoj.

SSOD, VCSPS kaj CK de VLKSM plenkonkrete substrekis en la akceptita la 27-an de decembro 1978 komuna decido, ke flanke de la sindikataj kaj komsomolaj organizajoj kaj amikec-asocioj devas plifortiĝi helpo al la esperantistoj. Ekzemple, nova klubo povas esti kreita se al ĝi estas garantiita gvido flanke de uzina (fabrika) sindikata komitato aŭ koncerna komsomola komitato, se ĝi havas ejon, lernilojn, kvalifikitan instruiston.

La demando pri fondo de Asocio de sovetiaj esperantistoj ne estas tute hazarda. Paroloj kaj sugestoj pri tio rondiris jam delonge. SSOD, VCSPS kaj CK de VLKSM per la menciita komuna decido subtenis la kreon de Asocio de sovetiaj esperantistoj.

La Asocio estas kreata enkadre de Unio de sovetiaj amikec-asocioj kun partopreno en la fondo kaj plua ĝia aktivado de VCSPS kaj CK de VLKSM. La laboro por prepari la nunan konferencon, kaj aliaj demandoj, ligitaj kun la kreo de la Asocio, estis komisiita al la Prepara komitato, kiu establis aktivajn ligojn kun lokaj sindikatoj kaj komsomolaj organizaĵoj, amikec-asocioj, apartaj kluboj kaj rondetoj. La ideo pri kreo de la Asocio ĉie estis renkontita aprobe. Ni esperas, ke ankaŭ nia Konferenco pasos samspirite.

La pridiskuto de la demando pri la kreo de la Asocio devas pasi, mia opinie, per interŝanĝo de opinioj pri la celoj, taskoj, la praktika agado kaj la strukturo de la kreata organizaĵo, t. e. pri la prezentita por analizo kaj aprobo projekto de Regularo pri Asocio de sovetiaj esperantistoj.

Ni opinias, ke la projekto estas plengrade trasorbita per la principoj de soveta socialisma demokratio, montras la nedisigeblan ligon kaj unuecon de la celoj kaj taskoj de la fondata socia organizaĵo kun la partopreno en la vivo de la soveta patrio, en la batalo por la tutmonda paco, internacia kunlaboro kaj progreso. Plue la parolanto diris pri la celoj kaj taskoj de la Asocio. (Kun tiuj oni povas konatiĝi en la Decido de la Fonda konferenco[1]).

Tutcerte, finas la raportanto, la Regularo ne entenas ĉiujn detalojn de la agado de la Asocio. Estas nenio danĝera en tio. La akumulota kun la tempo laborsperto de la Asocio donos rajton plibonigi poste ankaŭ la Regularon de la Asocio, fari aldonojn kaj ŝanĝojn.

Vladimir Samodaj rakontas pri la unuaj, eksperimentaj Esperanto-elsendoj de Moskva radio, kiujn reehis pluraj centoj da radioaŭskultantoj en dekoj da landoj.

Kreskas la intereso al la kulturo de nia lando. Pri tio interalie atestas ankaŭ tiu resono, kiun kaŭzis eksterlande niaj literaturaj eldonoj en Esperanto. Tamen dume ni eldonis malmulte, substrekas la parolanto, sed la intereso al la rusa literaturo estas granda, kaj la verkoj de niaj verkistoj en la internacia lingvo aperadas ne nur en nia lando, kaj ne ĉiam en bonaj tradukoj.

Ĉe ni en USSR estas perfektaj tradukistoj al Esperanto: moskvano Konstantin Gusev, odesano Sergej Rublovi (†) kaj aliaj. Ili tradukis en la internacian lingvon tiajn ĉefverkojn, kiel „Eŭgeno Onegin“ de Aleksandr Puŝkin kaj „Vladimir Iljiĉ Lenin“ de Vladimir Majakovskij, kio atestas ankaŭ pri la matureco de Esperanto kiel lingvo de tradukoj. Bedaŭrinde, ne ĉion el la tradukitaj verkoj oni sukcesis publikigi. Sed tio estas nia kultura heredaĵo, kaj post la kreo de la Asocio ĝi ne devas resti senuze. Samtempe oni devas kreskigi novajn talentajn tradukistojn, kapablajn transdoni en Esperanto la plej bonajn literaturajn verkojn de la sovetiaj popoloj.

Pri batalo de esperantistoj por la paco rakontis Dmitrij Perevalov. La 28-an de januaro junaj moskvaj esperantistoj organizis la unuan en la mondo dimanĉlaboron de solidareco kun la popolo de Kampuĉio. Kune kun ili en la olimpika konstruejo en Moskvo laboris studentoj el Francio, Vjetnamio, Srilanko kaj aliaj landoj. La perlaborita mono estis sendita al la helpofonduso por la popolo de Kampuĉio. Tiu iniciato estis respegulita en la sovetia kaj eksterlanda gazetaro, detalan raporton pri ĝi publikigis la vjetnama ĵurnalo „Kuan doj njan zan“. Kaj la vizitinta Moskvon ĝenerala sekretario de CK de Unueca fronto por Nacia saviĝo de Kampuĉio kamarado Roĥ Samaj esprimis al al moskvanoj dankon.

Konklude Dmitrij Perevalov proponis sendi telegramon subtene al Vjetnamio, rebatanta la ĉinan agreson. La propono estis unuanime akceptita de la konferencanoj.

La delegito el Estonio Jaan Ojalo rakontis: En nia respubliko estas emisiitaj kelkaj libroj en Esperanto kun suma eldonkvanto 49 000 ekzempleroj-verkoj de plej bonaj estonaj verkistoj. Helpe de esperantistoj, sendantaj tiujn eldonaĵojn al la eksterlandaj amikoj, niaj verkistoj estas legataj en multaj landoj, de Kubo ĝis Japanio. Ĉu ĝi ne estas ekzemplo de tio, kiel la internacia ligo helpas popularigi la nacian kulturon de negranda popolo?

Esperanto helpas al ni, barnaulaj esperantistoj, diris delegito el Barnaulo Anatolij Gonĉarov, porti la vortojn de vero malproksimen ekster la limojn de nia lando. Ni ĉiam volonte reeĥas leterojn de amikoj, kiuj servas al la internacia edukado de junularo. Ekzemple, estis ĝojige ekscii, ke niaj nederlandaj kamaradoj konstruis memorialon sur insulo en Norda maro, kie dum la milito batalis sovetiaj partizanoj. Interese estis legi konfesan leteron de korespondanto el Svedio: „Vi estas feliĉaj, geknaboj, ĉar en via lando lerni povas ĉiu. Sed ĉe ni elteni studadon en altlernejo povas nur riĉula poŝo, sed se oni estas malriĉa, oni dronas en ŝuldoj“.

Tiajn leterojn ni publikigas en sovetiaj kaj eksterlandaj ĵurnaloj. La vorto havas grandan penetran forton, kiam ĝi iras de koro al koro, kaj la lingvo Esperanto donas al ni tiun eblon-komunikiĝi sen perantoj. Kiam antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj ni dissendis alvokon sendi al ni en Barnaulon infanajn desegnaĵojn, reeĥis 1 500 korespondantoj el 18 landoj. Tiamaniere ni organizis migran ekspozicion, aldoninte al ĝi subskribojn en Esperanto kaj la rusa lingvoj. Jam multajn jarojn ĝi kun konstanta sukceso estas eksponata en Omsko, Ufo, Ĉeljabinsko kaj aliaj urboj de la lando. Ekspozicio de desegnaĵoj de sovetiaj infanoj, kolektita de ni, stafete iras tra eŭropaj landoj. Antaŭnelonge, ekzemple, ĝi estis montrita en Hispanio. Kaj ĉie la lokaj esperantistoj aldonas al la desegnaĵoj subskribojn en siaj naciaj lingvoj kaj helpas al ĝia popularigo.

La internacia lingvo helpas al eksterlandaj esperantistoj konatiĝi kun nia lando, notis la prezidanto de Esperanto-komisiono ĉe Leningrada filio de SSOD Semjon Podkaminer. Nur dum la lastaj jaroj la esperantistoj de nia urbo akceptis 1 500 gastojn el eksterlando, inkluzive specialan amikectrajnon el GDR kun 150 esperantistoj.
Pri unu el eksterlandaj vojaĝoj rakontis instruisto el Ufo Boris Kolker. Ekvidinte dekojn da sovetiaj esperantistoj, germano el FRG miris: „Ĉu do ĉe vi estas nuligita la malpermeso pri eksterlandaj veturoj?“ Kaj kiam Kolker demandis la japanan korespondanton, kial tiu ne plu skribas al li, la respondo estis: „Mi aŭdis, ke al sovetianoj oni malpermesas korespondi kun eksterlandanoj“. Do necesis klarigi al ambaŭ sinjoroj, ke ili estis trompitaj de la okcidenta propagando kaj ke similaj „malpermesoj“ en USSR neniam estis.
Dirante la konkludan parolon, Mihail Pesljak pledis por plifortigo de la internaciaj kontaktoj de sovetiaj esperantistoj, eksterlandaj vojaĝoj, tendaroj kun partopreno de eksterlandaj esperantistoj, interŝango de leteroj kaj literaturo. Li substrekis, ke necesas plifortigi la eldonan laboron: eldoni en Esperanto pli da libroj, inkluzive la lernajn, emisii filmojn, eldoni revuon en la internacia lingvo. Tamen ĉio ĉi, notis li, iĝos realo nur ĉe aktiveco de la esperantistoj, ĉe ilia kapablo levi la esperantistan laboron sur novan ideologian ŝtupon.
Post tio la esperantisto-veterano Nikolaj Danovskij voĉlegis la salutmesaĝojn al la Fonda konferenco-de la Esperanto-asocioj el Hungario kaj GDR, de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj, de la redakcio de aŭstra bulteno „Internaciisto“. La eksterlandaj amikoj substrekas, kiom gravas kaj por ili, kaj por la sovetiaj esperantistoj, la kreiĝo de ASE-Asocio de sovetiaj esperantistoj. Ekde nun komenciĝas la nova etapo en uzado de la internacia lingvo por disvastigo de la ideoj de paco kaj amikeco inter la popoloj.
Kaj mi rememoras linion el letero de alia malnova esperantisto Stepan Titov, la patro de kosmonaŭto-2: „El la tuta animo mi aplaŭdas al la kreiĝo de la asocio de esperantistoj de nia lando“.
Mi opinias, ke al li aliĝos milionoj da amikoj de la internacia lingvo en USSR kaj eksterlande.

Aleksandr HARKOVSKIJ

[1]) vidu „der esperantist“ n-ro 4/79

Daŭrigo de p. 8 [Robert Muller]

mitato de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj ĉe UNESKO, kiu okazis en junio, dank' al la efika laboro de s-ro Chicot, nia reprezentanto en Parizo. Nia elektiĝo al la menciita komitato estas gravega atingo, ĉar ĝi metas nin inter la gvidajn organizojn en la rilatoj kun UNESKO kaj igas nin ne nur prizorganto de la propraj aferoj sed unu organizanto de la tuta programo de la rilatoj inter UNESKO kaj la neregistaraj organizoj. ... Kvankam la situacio de UEA ĉe UNESKO plifortiĝas, kaj kvankam la neregistaraj organizoj en rilatoj kun UNESKO komencas rekoni la seriozecon de nia laboro, ni ne supozu, ke ni estas nur unu paŝon for de akceptigo de Esperanto ĉe internaciaj organizoj. La vojo estas ankoraŭ longa kaj malfacila. Sed mi ripetas, ke ni havas ĉe ni la spiritajn kaj homajn fortojn por sukcesi en la agado se ni utiligos ilin plene, sindone kaj en spirito de aktiva kunlaboro kaj reciproka fido, kaj se la anoj de la Asocio estas pretaj ne nur ĝui Esperanton (kvankam ankaŭ tio estas grava!) sed ankaŭ labori por ĝi. ...

En junio 1979 fondiĝis Asocio de Kubaj Esperantistoj

Okaze de sia restado en Berlin, dum julio 1979, s-ro René Valdés López, afable donis al „der esperantist" intervjuon pri la ĵus en junio fondita Asocio de Kubaj Esperantistoj.

1. Ĉu la Esperanto-movado en Kubo havas iujn tradiciojn, se jes, kiujn?

Bedaŭrinde, nia nuntempa Esperanto-movado ne estas rekta ido de antaŭaj Esperantaj organizaĵoj, kiuj sendube ekzistis en nia lando, sed kies laboro hodiaŭ estas apenaŭ konata de ni. Tamen ni povas aserti, ke verŝajne ekde la unuaj jardekoj de nia jarcento ĝis la kvindekaj jaroj ekzistis nacia kuba organizaĵo, pri kiu ni ne havas pluajn sciaĵojn. Krome aperis regula gazeto sub la nomo „Latinamerika Esperantisto", evidenta signo de ia jam tiam ekzistanta latinamerikanisma sento inter la esperantistoj. Rilate al scienca okupiĝo pri Esperanto menciindas doktoriĝa laboro pri Esperanto prezentita en la Universitato de Havano en la jaro 1928[1]). Kaj fine, nin atingis kopiaĵo de saluto solidara sendita de ĉirkaŭ 30 laboristaj organizaĵoj de Kubo al la „liberaj laboristoj de Irkutsk" (Sovetunio) okaze de la unua de majo 1930 en Esperanta lingvo. Ni intencas iom pli profunde okupiĝi pri la historio de nia movado.

2. Ni aŭdis kun granda ĝojo pri la fondo de Asocio de Kubaj Esperantistoj. Bv. informi nin pri la celo de AKE.

Kuba Esperanto-Asocio celas disvolvigi ampleksan kaj kiel eble plej amasan Esperanto-movadon en nia lando, metante nian lingvon antaŭ ĉio en servon de popolamikeco kaj internaciismo. Ni intencas instrui la lingvon al la granda kvanto de interesiĝantoj, traduki Esperanten kuban literaturon kaj politikajn verkojn, reprezenti nian landon en internaciaj Esperanto-aranĝoj, favori la sciencan esploradon pri kaj en Esperanto, informadi la publikon, apogi la lukton de la popoloj por sovereneco kaj libero kontraŭ la imperialismo, la novkoloniismo kaj la rasismo.

3. En kia socia kadro eklaboros AKE kaj kiujn plej gravajn planojn ĝi starigis al si por la proksima estonteco?

KEA eklaboros, aŭ pli bone eklaborados kiel asocio patronata de la vicdirekcio pri sociaj sciencoj de la Akademio de Sciencoj de Kubo. Tio estas favora cirkonstanco, ĉar tiamaniere la Esperanto-movado povos disvolviĝi sub la prestiĝa tegmento de longjare sukcese laboranta ŝtata institucio. Pri ĝeneralaj celoj kaj perspektivaj planoj mi jam parolis en la antaŭa respondo. Pli konkrete ni planas kaj laboros en la starigo de tuta aparato, konsistanta el rondoj kaj delegitoj en la diversaj urboj kaj provincoj. Ni intencas do akceli la fondon de kiel eble plej multaj societoj aŭ rondoj en kiel eble plej multaj lokoj tra la tuta lando por povi nomi nian movadon kaj nian asocion vere nacia kaj popola. Aliflanke ni flegos la ligojn kun la asocioj kaj organizaĵoj eksterlandaj, antaŭ ĉio de socialismaj landoj kaj karibaj kaj latinamerikaj landoj, por garantii la enkorpigon de nia asocio en la mondan Esperanto-movadon. Mi ne dezirus preteratenti la sciencan laboron. Pri ĝi estas ankaŭ parolata en la antaŭa respondo. Ĉar ni tamen nun menciis nian patronatecon je Akademio de Sciencoj, mi dezirus substreki, ke tio konsciencigos

nin ankoraŭ pli forte pri la neceso kaj la utilo de scienca esplorado, kiel rimedo por evoluigi la lingvon, por perfektigi la posedon de la lingvo ĉe niaj anoj kaj por altigi la prestiĝon de nia movado.

4. **Bonvolu iom informi pri la ĝisnunaj rilatoj de kubaj esperantistoj al la internacia movado.**

Ĝis nun ni havis rilatojn kun pluraj organizaĵoj el diversaj landoj. Antaŭ ĉio ni devas mencii la bonajn rilatojn kun la Esperanto-movado en socialismaj landoj. Ni jam de antaŭ jaroj regule kaj senpage ricevadas revuojn kiel „Paco" kaj „der esperantist", sendataj de BEA kaj de CLE en KL de GDR. De BEA ankaŭ regule alvenas „Bulgara Esperantisto". Ankaŭ kun Vjetnamio la kontaktoj estas tre bonaj, antaŭ ĉio ekde la vizito de k-do Ngyuen van Kinh al Kubo, en oktobro 1977, kiu signifis grandan helpon sur la vojo al nia oficialiĝo. El Vjetnamio ni ankaŭ senpage ricevis kaj ricevas librojn kaj publikaĵojn. Kun Hungario ekzistas ankaŭ tre bonaj rilatoj, sed antaŭ ĉio en persona bazo. Simile estas la situacio kun aliaj socialismaj landoj. Mi ne deziras forgesi la tre valoran apogon ricevitan de UEA kaj de kelkaj organizaĵoj en hisponparolataj landoj, kiuj sendis al ni lernolibrojn kaj vortarojn por niaj lernantoj.

5. **Kiel vi prijuĝas la rilatojn de la kubaj esperantistoj al Centra Laborrondo Esperanto en KL?**

La rilatoj de kubaj esperantistoj al CLE en KL estas en favora momento. Mi jam menciis la apogon de la GDR-esperantistaro al ni, antaŭ ĉio per sendo de materialoj. Nun post la oficialigo de nia movado malfermiĝas novaj eblecoj por kunlaborado kaj pro la similaj sociaj kaj politikaj kondiĉoj mi antaŭvidos tie fortajn rilatojn inter nia nova KEA kaj CLE en KL. Mi deziros, ke tio vere realiĝu, ĉar ni multe povas ankoraŭ lerni de vi kaj eble en baldaŭa estonto ni estos kapablaj ion alporti al vi kaj al la monda Esperanto-movado.

6. **Ni scias, s-ro Valdés, ke vi estas profesia instruisto de la germana lingvo. Bonvolu ion diri pri viaj spertoj dum restado en GDR.**

Mi estas duafoje en GDR kaj miaj impresoj kaj spertoj estas ĉiam pli kaj pli favoraj kaj pozitivaj. Vi sukcesis krei el ruinoj novan socion, kie la egaleco kaj la solidareco inter la homoj evidentas kaj kie la progreso estas ĉiam denove palpebla. Estus neeble paroli pri iu ajn specifa temo. La prelegon kaj klason, kiujn mi ĉeestis, estis tre altkvalitaj, la muzeoj, impresoj, la arkitekturo kaj malavareco, mirinda, la lando, belega ... Mi ankaŭ estonte kaptos kun plezuro kaj ĝojo la eblecon denove viziti GDR.

---

[1]) *Elias J. Johns: El Problema de una Lengua Auxiliar Internacional y su Solución: El Esperanto la Habana 1928*

Korekto

En n-ro 3/79 de „der esperantist" ni raportis sur p. 10 pri televida programo pri Esperanto. Ni petas korektu, ke la gvidanto de la programo estis Roman Dobrczanski.

133 tagoj

La 21an de marto 1919 en Hungario estis proklamita proletara diktaturo: la Hungara Konsilia Respubliko. Post la Granda Socialisma Oktobra Revolucio ĝi estis la unua provo en Eŭropo starigi ankaŭ en alia lando la potencon de la laborista klaso. La Respubliko nur vivis 133 tagojn. La 1an de aŭgusto ĝin frakasis la reakciaj trupoj de Entento, helpitaj de la enlandaj dekstraj fortoj. Ĉijare oni omaĝis al tiuj heroaj klopodoj de la hungara popolo. „Estis antaŭ 60 jaroj", oni titolis programon, kiun prezentis la 29an de junio ĉijare tri hungaraj esperantistoj en la Hungara Kulturdomo en Berlin. La programon ellaboris kaj gvidis la membro de la redakcio de „Hungara Vivo", la ĵurnalisto Peter Rados, subtenata de Katalin Vittay, studentino en la Esperanto-fako de la universitato Budapest, kaj de la teknikisto Zoltan Havasi. Prelego, deklamado, diapozitivoj pri la historiaj tagoj kaj muziko estis lerte muntitaj al impresa tuto.

La pli ol 50 esperantistoj el Berlin kaj aliaj lokoj havis krome la eblecon diskuti kun la prezentintoj pri diversaj aspektoj de la hungara Esperantomovado. La saman programon la triopo ripetis antaŭ 40 esperantistoj en Leipzig, la 30an de junio. Tie la programo estis parto de germana-hungara amikec-vespero, kiu finiĝis nur meznokte.

Hungara Esperanto-Asocio meritas dankon, ĉar ĝi iniciatis celkonscie kaj bonsukcese la omaĝon al la tradicioj de la socialisma ŝtato, tradicioj, kiuj estas tre viglaj en Hungario kaj alte aprezataj en GDR. Montriĝis la utila kulturpolitika rolo de Esperanto kiel peranto de scioj kaj de konoj pri niaj amikaj landoj. Jam 1978 en Berlin oni aranĝis interesan vesperon pri Endre Ady. Bona vojo ankaŭ estonte.

Valoras substreki, ke ankaŭ la laboristaj esperantistoj ludis aktivan rolon dum la Konsilia Respubliko, pri kio oni povis legi interesajn studojn de A. Ratkai („A. Stromfeld, la esperantisto" en „Budapeŝta Informilo" 3/78) kaj de Ervin Fenyvesi „Generalo, revoluciinto, esperantisto" en „Hungara Vivo" 3/1978.

Jam 1930 la soveta-germana eldonejo EKRELO eldonis la libron „Cent tridek tri tagoj" historia skizo de la hungarlanda proletara revolucio. Ĝi estas kompilo de elektitaj artikoloj de gvidantoj kaj aktivuloj de la hungara proletara revolucio. HEA, kies libroproduktado lastatempe alprenis admirindan amplekson, reeldonis tiun verkon ĉijare aldonante tre utilan ĉapitron de Z. Borna kaj E. Fenyvesi pri „Esperanto-Movado dum la revolucioj". Pri la verko, kiu estas havebla ĉe CLE (10 m.) aperos recenzo.

D. B.

Alvoko al ĉiulandaj geesperantistoj

Fine de la kuranta jaro nia Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola amikeco aranĝos grandskalan porpacan ekspozicion, kies ekspoziciaĵoj estu ricevitaj nur pere de Esperanto.
Ni esperas, ke ĉiulandaj geesperantistoj-pacbatalantoj helpos nin kaj sendos al ni konvenajn materialojn/salutleterojn, ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, flugfoliojn, revuojn, ĵurnalojn, libretojn, desegnaĵojn, fotojn de porpacaj manifestacioj, kunvenoj k. t. p.
Ni nepre respondos al ĉiu amik(in)o, kiu sendos al ni ekspoziciaĵojn. Krome ĉiu sendinto ricevos uzbekan nacian memoraĵon.
Bonvolu sendi ĉion laŭ la adreso: Anatolo Ionesov, SU-703000 Samarkando, ul. Sovetskaja 53, Uzbekio.

Esperanto Bücher aus Ungarn

Es bestehen neuerdings beste Möglichkeiten, relativ schnell in Ungarn erschienene Esperanto-Bücher zu beziehen. Folgende Titel können d i r e k t beim Ungarischen Kulturzentrum (102 Berlin, Karl-Liebknecht-Straße 9) bestellt werden:

1. G. Gárdonyi: Sklavoj de Dio (Romano pri mezepoka vivo, 409 p.)
2. F. Szilágyi: Koko krias jam! (Fama originala novelaro, 200 p.)
3. L. Tárkony: De paĝo al paĝo (Eseoj pri la originala Esperanta literaturo, 121 p.)
4. Auld-Dinwoodie-Francis-Rossetti: Kvaropo (Plej fama poemaro de la moderna Esperanta poezio, 252 p.)
5. J. Baghy: En maskobalo (Kvin intereskaptaj kaj facilflue legeblaj teatraĵetoj de la fama aŭtoro, 140 p.)
6. Csiszár-Kalocsay: 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj (Frazeologio bone utiligebla ankaŭ por nehungaroj, 188 p.)
7. Esperanta-Kamboĝa Vortaro (La unua lernilo de Esperanto en tiu lingvo, 148 p).
8. F. V. Dorno: Satiroj: Aventuroj de L. R. M. Stultulof la Xa de Fuŝio — Levu la manojn! (Sprita satiro pri kretena reĝo, kaj krimkomedio okazanta dum Esperanto-kongreso, 140 p.)
9. E. Ady: La morto de la ĉielarko (Poemoj kaj artikoloj de elstara hungara poeto kaj pensulo, plejparte en la traduko de K. Kalocsay, 90 p.)
10. S. Szathmári: Kain kaj Abel (Novelaro, kiu kompletigas la esperantlingvan verkaron de la elstara originalverkisto, 286 p.)
11. Turista Kantaro: (58 kantoj tradiciaj kaj popolaj, ĉiuj kun muziknotoj, 84 p.)
12. 25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj 1951 — 1975 (Tiu ĉi libro — redaktita de W. Auld kaj V. Benczik — enhavas la kremon de la premiitaj poemoj kaj prozaĵoj, 208 p.)
13. F. Molnár: La knaboj de Paŭlo-strato (Infanpsikologia romano de fama aŭtoro, konata unuavice kiel dramisto, 180 p.)
14. M. Jókai: La filoj de l'ŝtonkora homo (Teknike luksa bildrakonto, farita laŭ romantika romano, 64 p.)
15. I. Lejzerowicz: El la „Verda Biblio" (Satiro pri la Esperanto-movado, 80 p.)
16. Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado (Studaro — redaktita de D. Blanke, 226 p.)
17. Esperantologiaj kajeroj 1, Budapest 1976, Universität Eötvös Loránd, Philologische Fakultät, Bereich Esperanto am Lehrstuhl für Allgemeine und Angewandte Sprachwissenschaft
18. Esperantologiaj kajeroj 2, Budapest 1977
19. Esperantologiaj kajeroj 3, Budapest 1977
20. István Szerdahelyi: Metodologio de Esperanto, Kézirat, Tankönyvkiado, Budapest 1976
21. István Szerdahelyi: Esperanto 1, internacia, Tankönyvkiado, 1972
22. István Szerdahelyi: Esperanto 2, Tankönyvkiado, Budapest 1968
23. Pechan: Gvidlibro por supera ekzameno
24. Benczik: Baza Literatura Krestomatio
25. Rados: Hundbazaro, libro kun poemetoj por infanoj, kun desegnaĵoj

Der Ungarische Esperanto-Verband gibt laufend neue wertvolle Bücher heraus. Wir werden ständig über das neueste Angebot informieren.

GDR-eldono de „Paco“ 1979

Kiel jam neinterrompe ekde 1966 ankaŭ ĉijare aperis numero de „Paco“, eldonita de la MEM-sekcio de GDR. Kiel kutime, ĝi ampleksas 40 paĝojn, estas el luksa papero kaj riĉe ilustrita. Gravaj materialoj koncernas la malarmadon (p. 2—4), inkluzive intervjuon kun la prezidanto de MEM, d-ro Pethes. Sur la paĝoj 5—7 oni povas legi pri aspektoj de la 30-jara evoluo de GDR (minoritata politiko kaj superrigardo pri la evoluo de GDR). Ampleksa studo de Hermann Klenner pritraktas la temon „Homaj rajtoj kaj internacia juro“ (p. 8—10). Pro la afableco de Janusz Sulzycki el Pollando la ĉijara GDR-numero enhavas vere unikan materialon pri „P 23407“, la pola esperantisto Albin Makowski, kiu rakontas pri sia restado en la hitlera koncentrejo Stutthoff, kie li kaŝe instruis Esperanton (p. 12—15). Plua materialo rakontas pri Janusz Korczak, pola pedagogo, pri kiu memorigas UNESKO. J. Uspienski tradukis libron pri la granda humanisto (p. 18—20). La centra faka artikolo de Detlev Blanke traktas la „internan ideon“ (p. 28—35). Krom tio la kajero enhavas diversajn poemojn de Rejna de Jong, Daŝdondag, Zarycki, Weinert, Kästner, Logvin, Poliŝĉuk, rememorigojn pri la verkistoj Kästner, Lessing kaj Hemingway kaj pri la esploristo Ronald Amundsen.

Ne mankas tekstoj por distra legado (La golŝutisto), recenzoj de Esperantaj verkoj (Varankin: Metropoliteno, Ady: La morto de la ĉielarko, Antologio de Belartaj konkursoj, Linnan Koski: La kanto pri la fajr-ruĝa floro, Bulgarino, Molnár: La knaboj de la Paŭlo-Strato, Kanto super lulilo, Schulz: Mein geliebtes Esperanto (Mia amata Esperanto) kaj necesa deklaro pri „La perdita honoro de iu Katarino Blum. Ĉirkaŭ 80 koresponddeziroj el GDR, Hungario, Japanio, Pollando kaj Soveta Unio finas la kajeron, kiun redaktis d-ro Detlev Blanke. Havebla ĉe CLE.

★

Ni gratulas

— al Johannes Dittrich, el Roßwein, kiu estis distingita per la Ora Honora Pinglo de la Societo por Germana-Soveta Amikeco

— al Walter Röhner, kiu estis honorigita okaze de lia 70-a naskiĝtago per la plej alta distingo de Kulturligo, la Johannes R. Becher-Medalo en Oro.

★

Ni kondelencas

— pro la morto de la iama LEA-membro Willi Pfeifer el Erfurt (12. 11. 1888 — 12. 7. 1979)

— pro forpaso de Johannes Köhler el Bautzen (20. 5. 1979), iama membro de LEA,

— pro forpaso de la konata soveta esperantisto S. G. Rublov (8. 7. 1979)

Partnerurbaj rilatoj inter Pazarĝik kaj Karl-Marx-Stadt

De 9a ĝis 14a julio 1979 restadis 10-persona esperantista grupo el Pazarĝik en sia ĝemela urbo Karl-Marx-Stadt. La vizito okazis surbaze de kontrakto subskribita inter la estraroj de la Esperanto-grupoj de ambaŭ urboj.

La gastoj ne nur konatiĝis kun la vidindaĵoj de Karl-Marx-Stadt sed ankaŭ vizitis Leipzig, Dresden, Freiberg, la kastelon Augustusburg kaj Berlin kaj havis amikajn renkontiĝojn kun tieaj esperantistoj.

La bulgaraj gastoj invitis reprezentantojn el la grupo de Karl-Marx-Stadt al reciproka vizito al Bulgario. La restado de la bulgaraj gastoj estis tre utila por la plifortigo de la partneraj rilatoj inter Karl-Marx-Stadt kaj Pazarĝik ankaŭ helpe de Esperanto.

Kulturliga honorigo por Nikola Aleksiev

La Prezidio de Kulturligo de GDR distingis la 29an de junio 1979 Nikola Aleksiev okaze de lia 70a naskiĝtago per sia plej alta ordeno, la Johannes-R.-Becher-Medalo en Oro, substrekante la grandajn meritojn de la jubileulo sur la kampo de internaciisma kulturpolitika agado.

La tagĵurnalo „Der Morgen“ (La Mateno) en sia eldono de 29. 6. 1979 publikigis ampleksan artikolon de Peter Levsen pri la jubileulo (kun foto).

★

Alta ŝtata distingo por N. Aleksiev

La Ŝtata Konsilantaro de la Popola Respubliko Bulgario distingis k-don Nikola Aleksiev okaze de lia 70a naskiĝtago pro liaj grandaj meritoj kiel socia laboranto per la plej alta titolo „Heroo de la laboro“. Kun ora stelo. Centra Laborrondo Esperanto, en la nomo de la esperantistoj de KL de GDR, tre kore gratulas pro tiu grava rekono de la multflanka agado de Nikola Aleksiev.

★

Persone

Nehavante eblecon respondi al la gratuloj kaj bondeziroj ricevitaj de esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj kaj individuoj lige kun mia 70-jariĝo kaj kun mia distingigo per la plej alta honortitolo de la bulgara ŝtato „Heroo de socialisma laboro“ kun ora stelo, mi transdonas per Via redakcio miajn plej korajn dankojn al ĉiuj salutintoj.

Sofio

Nikola Aleksiev
Honora prezidanto de MEM,
membro de Monda Packonsilio

★

Internacia letervespero

Ĝis la 15a de decembro 1979 la Esperanto-grupo el Waltershausen (W. Habicht, DDR-5812 Waltershausen, Lessingstraße 9) atendas leterojn aŭ salutkartojn el la tuta mondo.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Pollando

Elektroteknikisto, 24j., dez. kor. tutmonde pri E-movado, geografio. muziko, tekniko, kol. E-pm, glumarkojn, insignojn, aliajn esperantaĵojn: Grzegorz Ciemny, ul. Wierzbinskiego 93a, **PL-88-100 Inowroclaw**

Junulino, 15j., dez. kor. k. germanaj gejunuloj pri muziko, filmo: Ewa Bartnik, Kordeckiego 24/18, **Czestochowa 42-200**

Rumanio

Studentino dez. kor. pri lingvoj, literaturo, pentroarto: Dana-Ligia Ilin, Bd. Magheru, 31—36, sc. A, ap. 32, **Bucuresti 70159**

Studentino dez. kor. tutmonde pri lingvoj, literaturo: Aura Soare, str. Uioara 6, bl. 54, sc. II, ap. 37, **Bucuresti 75426**

Studentino dez. kor. tutmonde pri lingvoj, literaturo: Elena Petruc, str. Reconstructiei 1, bl. 24, sc. 3, ap. 120, **Bucuresti 74531**

Studento dez. kor. pri matematiko: Dan., Stoichitoiu, str. 23. August 32, **bis. Tîrgu Jiu, R-1400**

Lernantino, dez. interŝanĝi bk tutmonde: str. Litoralului nr. 9, **Bucuresti 11. sect. II, R-72451**

Soveta Unio

Studento, 20j., dez. kor. p. ĉ. t., kol. bk, gazetojn: Anatolij Gulidov, **634003 Tomsk-3,** abon. jaŝĉ. 524

Geklubanoj de Esperanto-Klubo, A. K. N. 8, **153000 Ivanovo-Centro,** dez. kor.

Barauskas Arunas, Batakiu gelez. **st. Taurages raj.,** Litova SSR, 15j., dez. kor. pri muziko

Inĝenierino, 40j., dez. kor. pri ĉ. t., kol. bk, pm: Ella Ogonjkova, **310103 Harkovo,** str. Derevjanko 24a, ap. 31

Matematikisto, 27j., dez. kor. pri poezio, jogo: Aleksandr Lukin, **310022 Harkovo,** str. VIII Sjezda Sovetov 2, ap. 223

Inĝenierino, 29j., dez. kor. pri turismo, sondiskoj, literaturo: Tatjana Citko, **310171 Harkovo,** str. Petrozavodskaja 103, ap. 194

Inĝenierino, 24j., dez. kor. pri literaturo: Lubovj Košelnikova, **312830 Cuguev,** str. Dobrolubova 27

Inĝenierino, 25 j., dez. kor. pri arto, literaturo: Vera Guk, **310023 Harkovo,** str. Černiŝevskogo 96, ap. 39

Inĝenierino, 23j., dez. kor. pri arto, literaturo: Natalia Petrova, **310007 Harkovo,** per. Mira 2, ap. 76

Studentino, 22j., dez. kor.: Natalia Gujeva, **320081 Dnepropetrovsk,** av. Pravda 14, ap. 39

Instruistino de angla kaj germana lingvoj, 33j., dez. kor.: Lilia Karaĉeva, **307340 Kurska regiono,** Rilska distrikto, Ivanovskoje, str. Gora

Instruistino de fremdaj lingvoj, 22j., dez. kor. tutmonde, interŝangas revuojn, ĵurnalojn, librojn, diskojn: Tanja Tarakanova, **665710 Bratsk-10,** strata Pihtowaja 16a—20

Junulo, 21j., dez. kor. tutmonde, kol. diskojn, revuojn, bk: Laimius Stražnickas, Topolius 4—41, **234580 Alytus-3,** Litovio

Eŭgeno Kazekin, **343116 Donecka obl.,** Dimitrovo, ul. Koševogo 6, Ukrainio, dez. kor. kun amikoj el GDR

Anatol Gorskij, ab/ja 713, **665709 Bratsk-9,** dez. kor., kol. ludkartojn

35jara mezlerneja instruistino, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, prospektojn, gramofondiskojn, esperantaĵojn: Marta Hrihora, **Vinogradovo,** ul. Ukrainska 20, Zakarpatio

Studentino, 19j., dez. kor. tutmonde pri arto, muziko, teatro, literaturo, kol. bk, gramofondiskojn, plakatojn: Rasa Čepulyte, Šiauliai, **Talŝos 2—18,** Litovio

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 804